

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 30-an de novembro 2017 per Skype.

Partoprenis:

Mario Machlik en Tromsø
Ulf Lunde en Os
Lars Sandbakk en Sandnes
Anne Karin Bondhus en Bryne
Amelie Matt en Tromsø
(mankis Jardar E Abrahamsen en Trondheim)
(mankis Heming W Thorbjørnsen en Haugesund)

0. Tagordo

Aprobata.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 26-an de oktobro

Aprobata.

2. Ekonomio

Jen la valoroj en la Skagenfondaĵoj en la estrarkunveno la 30an de novembro 2017:

100010836334 ✎

NOK ▼

100010836334 - Investorkonto



Portefølje

Investeringer	Kostpris	Gevinst/tap	Markedsverdi
SKAGEN Vekst A	25 000 NOK	38 262 NOK ↑	63 262 NOK Kjøp ▼
SKAGEN Høyrente	113 101 NOK	18 906 NOK ↑	132 007 NOK Kjøp ▼
Sum	138 101 NOK	57 167 NOK ↑	195 269 NOK

(En oktobro la sumoj estis 62 050 kaj 131 874.)

Pluraj membroj ankoraŭ ne pagis membrokotizon por 2017. La estraro petas Anne Karin kaj Douglas iel memori la nepagintojn pri la kotizo.

3. Skandinava kongreso 10a -13a de majo 2018

<http://esperantonordio.org/index.php/eo/>

Sveda SEF, dana DEA kaj norvega NEL konsentis aranĝi kongreson kune sur ŝipo la jaron 2018. SEF kaj DEA havos siajn jarkunsidojn sur la ŝipo. La aranĝo okazos je la 100-jara jubileo de la unua skandinava kongreso. La ŝipvojaĝo iras inter Kopenhago kaj Oslo kaj la partoprenontoj povas decidi en kiu urbo ili volas komenci la vojaĝon. DEA kaj NEL ofertas ekskursojn/ĉiĉeronadon en Kopenhago kaj Oslo.

Por ĉiĉeronado en Oslo jam ekzistas planoj kaj volontulaj ĉiĉeronoj (Cato kaj Birgit). Eble ni ankaŭ invitos iun publikan reprezentanton de Oslo por bonvenigi la esperantistojn kaj interparoli iomete pri Esperanto.

Norvegaj aliĝontoj pagu sian aliĝkotizon al la bankkonto de NEL.

4. Seminario 2018

La kongresa ŝipekskurso povos esti seminario en si mem. Dum la ŝipo restas en haveno kaj havas bonan retkonekton, eblas ankaŭ kontakti esperantistojn kiuj ne ĉeestas.

I.a., Mario povos rakonti pri kaj eventuale montri bildojn de sia japana vojaĝo.

Se bezonate, eblas ankaŭ aranĝi "normalan" seminarion aŭtune.

5. Agado en Facebook

Nenio nova okazis lastatempe pri NEL en Facebook. Indas komenci iom da aktivado tie, por montri, ke Esperanto vivas en Norvegio.

Propono: Verku ion pri la onta Skandinava kongreso.

Estas ankaŭ bone, kiam NEL-membroj havas ion en aŭ pri Esperanto en siaj privataj Facebook-paĝoj.

6. Eventualajoj

Datoj por venontaj interkonsiliĝoj.

Ni proponas interkonsiliĝi la 25an de januaro kaj tiam plani la printempan kunvenprogramon.

La interkonsiliĝo daŭris de 19.30h ĝis 21.00h.

La venonta interkonsiliĝo okazos la 25.01.

Raportis Ulf Lunde.